

# O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

ANO 42 — N.º 127 — 129 (413-415)

Telegrafa adreso: **ESPERANTOLIGO**

JULHO — SETEMBRO, 1948

Diretor: A. Caetano Coutinho  
Redator responsável:  
Dr. Carlos Domingues  
Telefone — 42-4357

Administração e redação:  
Praça da República, 54-sob.  
Rio de Janeiro — Brasil

Gratuito para os sócios da Liga  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondkuponoj.

## LA LIBRO

Libro estas magia brako, per kiu la homo kapablas agi samtempe en diversaj lokoj kaj ĉe kunlabori kun estontaj generacioj. Kelkaj libroj gvidas la generaciojn unu post alia en la sama direkto, ĉu bona, ĉu malbona: tio ja dependas de vidpunktoj, sed neniel malgrandigas la povon de la libro.

Kelkaj libroj, skribitaj en pasintaj jarmiloj, montras al la homoj ilian vojon kaj estas pie obeataj de tutaj popoloj: Vedioj, Biblio, Korano gvidas la mondon, eksplodigas militojn kaj restarigas pacon. Centoj da milionoj da homoj estis iam mortigitaj pro obeo al tiuj libroj, sed ankaŭ milionoj da aliaj ne estas mortigitaj ĝuste pro obeo al tiuj samaj verkoj.

En ĉiuj tempoj aperas libroj, kies forto gvidas popolojn, kaŭzas militon, entuziasmigas kaj ofte fanatikigas homojn, kreas amon aŭ malamon. Ĉiu nacio havas siajn librojn, el kiuj ili ĉerpas forton kaj unuecon por agado. Sed la plej utilaj libroj estas nur sciencaj, kolektas la scion de pasintaj generacioj kaj ĝin pligrandigas por la estontaj homoj.

La mondforto de la libroj, en la pasinteco, estis akirita malrapide, tra la tradukoj de unu en diversajn idiomojn; sed en la estonteco tian forton la bonaj libroj akiras tre rapide, ĉar ili ne dependas de tradukoj: la tuta klera homaro posedas la saman mondlingvon, per kiu la libro tuj atingos la filojn de ĉiuj nacioj, sen la lingvaj baroj de la mallumaj jarcentoj. La plena forto de la libro apartenas al la estonteco, kiam ĉiu eminentulo verkos samtempe por la tuta homaro, ne nur por siaj samlingvanoj.

En sia Esperanto-movado ni jam konstatas la povon de la libro. Kelkaj el niaj plej kleraj instruistoj jam mortis, tamen per siaj libroj ili daŭrigas sian brilan laboron. Zamenhof, Grabo-

wski, Bourlet, Grosjean-Maupin, Benson jam malaperis de nia mondo, sed per siaj verkoj ili nin senĉese instruas. La ovo, el kiu elkoviĝis la tuta movado, estis la 40-paĝa **Unua Libro**, de Doktoro Esperanto, aperinta en la 14a de Julio 1887.

Niaj kongresoj, ekskursoj, festoj, kantoj kaj dancoj estas tre necesaj, sed ili ne igu nin forgesi la libron, per kiu ni povas agi samtempe de diversaj lokoj kaj helpi la venontajn samideanojn. Ju pli da libroj ni eldonos, des pli forta estos nia movado. Ĉiu sincera esperantisto helpu laŭ sia povo la pliriĉigon de nia literaturo. La lertaj verkistoj kaj poetoj preparu originalajn, efektive gravajn verkojn; kompetentaj tradukistoj elektu kaj traduku eminentajn verkojn el sia nacia literaturo en Esperanton. Ĉiu grupo havu sian rondon el verkistoj kaj tradukistoj, gvidataj de la plej lerta en uzado de la lingvo. La kaso de ĉiu societo havu specialan konton por libroj: eldonado, aĉetado, disvendado, propagando de libroj.

En Brazilo ekzistas bonegaj libroj, tute nekonataj en aliaj landoj. Iuj devas traduki kaj eldoni tiajn verkojn en Esperanto kun triobla celo: 1. Helpi la pliriĉigon de la literaturo de Esperanto; 2. Kunlabori por plialtigi la mondkulturon; 3. Diskonigi en la mondo niajn naciajn trezorojn.

Kiuj estas tiuj "iuj"? Ĉu ne ni mem, samideanoj?

Kiu el ni ne konas ian verkon, kiun li dezirus aperigi en Esperanto?

La triumfon de Esperanto super ĉiuj aliaj projektoj de lingvo internacia naskis ĝia literaturo, kiu tuj donis al ĝi kulturan celon: sen sia riĉa literaturo, Esperanto certe restus tiel nekonata kiel dekoj da aliaj projektoj, kies nomojn nur tre malmultaj homoj en la mondo nun scias.

Nia enlanda movado estas iomete estimata, ĉar en la libroservoj de U.E.A. kaj aliaj aperas deko da libroj eldonitaj en nia lando; kiam tiu deko fariĝos centoj, ni estos altestimataj en la mondo.

Brazila Ligo Esperantista deziras eldoni ĉiam pli multe da libroj, sed por plenumi tian taskon ĝi bezonas la kunlaboradon de ĉiuj. Ĉiu povas kaj devas helpi, per mono aŭ per intelekta laboro, se ne per ambaŭ.

Memoru, ke ĉio forpasas, neniĝas: kongresoj, ekskursoj, tagmanĝoj, baloj, kunvenoj, gajaj festoj, belaj paroladoj daŭras semajnon, tagon, horon, sed libro restas ĉiam, daŭras jarcentojn, servas, instruas, kuraĝigas homojn tra generacioj.

Pripensu la temon "libro", leganto, kaj iel ajn helpu la libron en Esperanto.

Iam diris la mondfama profesoro Charles Richet: "Helpu la libron en Esperanto! Se vi nenion alian povas fari por la libro, aĉetu lernolibron kaj donacu ĝin al amiko. Tiel vi eble varbos vian amikon por la movado, kaj tute certe vi kuraĝigos la eldoniston daŭrigi sian taskon, ĉar se li ne vendas librojn, li ne presos ilin, kaj sen libroj Esperanto ne vivos". Ni igas niaj tiujn vortojn de nia karmemora franca samideano: Helpu, kiel vi povos, sed iel helpu la libron en Esperanto, se vi estas sincera esperantisto.

Kristano Hagarido.

## SHAKESPEARE EM ESPERANTO

A mais recente tradução da obra de Shakespeare.— Antonio kaj Kleopatro é a décima publicada em Esperanto, desse célebre escritor.

Depois de Hamleto, traduzido pelo Dr. L. Zamenhof, apareceram Makbeto, Rego Lear, Julio Cezaro, Venecia Komercesto, Kiel plaĉas al vi, La Ventego, Sono de Someromeza Nokto, Romeo kaj Julieta.

## EPOSO DE L' KOMENCO

Esperante verkita de  
Ernest Dodge, Usono.

Antaŭ Komenco estis Nenio,  
Nenio ie en la Univers'.  
Do ĉi Nenio estis la Ĉio, —  
Por l' ekzistaj' estonta, jen la erc'.

En la Komenco, la Ĉio dormadis,  
Dormadis sen konscio kaj sen mov',  
Sed ne en nesto; el si ĝi formadis  
La eston de daŭrada kaj de pov'.

Ĉongis la Larmo, post la Komenco,  
Ĉu la Ĉ' eterna daŭro la duon'.  
Ĉu ĉi? Ĉar estis venia potenco  
Por l' alpermesi songon, por ordon'!

Nalklaris la Songo, apud Komenco,  
Sed de pli bone, por l' estonta mond'!  
Ĉar ĉi ĝi klara estigis Intenco!  
Ĉestis tiel la Prakteska ond'.

Farigis la Kresko la Ĉiam-ĉesto, —  
Plej universalaga vero, ĝi, —  
Ĉe Nulo al Io, al herbo, al besto,  
Kaj grade al spirit-hierarki'.

Do plue ni pensu, pri la Komenco!  
Kreada sono prakterna, ĝi.  
Nu, kion bildinis tiama Intenco.  
Ĉu estis la Songo Ĉi aŭ Ĉi?

Songoj praambraj, senfine senombraj!  
Pri, de la mond', multeco miru ni!  
Songaj vekstreboj — ol mondo pli longaj,  
Kaj distflorontaj kreske, pli kaj pli!

Jes, en la prafruo la Dormo jam songis.  
Jam ne estante pli ol ombra "L'".  
Sed jam inter Bono, Malbono, distingis, —  
Pli daŭra Bon'. Malbon' kaduka pli.

Do tiel ni nomu Pradormon, Prasongon,  
Kaj Pramondstrebon, vekiganta ja  
Paŝpaŝe en mondon malfaldan kaj sangon,  
Sentime kreskan — la estontan tra!

Mondkora silentu pri ĝusta nomado!  
Sed lipoj poras ion en balbut'  
Pri l' Bono Eterna, Praktika Verkado,  
Kreanto, Dio, Ĉiamkreska Tul'...

## PREMIO AOS MEMBROS DE 1949

Os nossos consocios receberam com agrado, conforme manifestação que tivemos de muitos, o belo premio que lhes deu a Liga Esperantista Brasileira no corrente ano.

Podendo a Liga dispor de certo número de exemplares do "Urbo São Paulo", resolveu, à semelhança do que fez em 1948, dar como premio no ano próximo vindouro, aos socios das categorias Membro Abonante (MA) e Membro Subtenante (MS), que aderirem até 31 de Março, um exemplar daquela interessante e rica brochura.

SOCIÉTÉ FRANÇAISE

pour la

## PROPAGATION DE L'ESPERANTO

Siège Social: 27, Rue du Faubourg St-Jacques — PARIS-14<sup>e</sup>  
Secrétariat Permanent: 59, Rue de Neuilly — ROSNY-sous-BOIS (Seine)

UN ADMINISTRATEUR

LOUIS BASTIEN

Honor-Président de U.E.A.

113, Rue de Vaugirard

Paris (VI<sup>e</sup>)Paris le 24<sup>e</sup> de julio

1948

A Brazilo Ligo Esperantista  
Praça da República 56, Rio de Janeiro

La Estimataj Samidanoj,

Revenante Parizon, mi trovas la "Statistikan Resumon pri Brazilo", kaj la libron pri São Paulo.

Mi ne povas troi veran dankon kaj gratulojn la Brazilan Esperantistaron pro tiu belga rezultato de ĝia propagando. Ĉian Brazilo staris kape de Sud-Ameriko pri la esperanta propagando: speciale mi ne forgesu la

ŝ sukcesojn pri pastro. Tiu ĉi nova laboro estas unuaklasa propagandilo ĉe oficialaj rondoj, ĉar ĝi montras ĝisvidente la bezonon, kiu de nun povas fari sia longvo.

Ĝi estas ankau ekzemplo kaj modelo al aliaj landoj. En momento, kiam ni atendas novan lingvoprojektin, ĝi provas, la Esperanto ekzistas, estas la sola ekzistanta internacia lingvo. Ĝi ni atengus saman rezultaton sur en tri aŭ kvar ion grandaj landoj, la definitiva triamfo estas certa kaj proksima.

Tiel mi devas gratulas la amikojn, kies klopodado okazigis tiu belgan sukceson, kaj mi sendas al la Brazilaj Esperantistoj plij bonajn samidanojn sentojn



## Definitiva opinio

Genolino Amado

Sur la verando kiu rigardas al la maro, lumis la "hela suno, amiko de la herooj". Kaj velo de vaganta ŝipeto, kiu sporte ludis sur la golfeto Guanabara, rememorigis min pri la unuaj marveturantoj en la mondo.

Mia ekscitita imago jam ne montris antaŭ mi la novan Atlantikon ĉe tiuj ĉi amerikaj regionoj, sed la antikvan Mediteraneon, je la gloraj legendoj, je la jarmilaj herooj, kie la sirenoj enamigis al la ioniaj aventuristoj.

Kaj mi vidis Jazonon, kiam li foriris por konkeri la Orsaflanon, kaj Ulison, perdita je la reveno de Trojo, kiu vane esploris la lazurajn distancojn, serĉante la malgrandan insulon kiu konsistigis lian regnon. Post momento, mi jam estis en Salamino, kie mi ĉeestis la venkon de la atenaj kaj korintaj galeroj, en la batalo en kiu Grekujo riskis sian destinin.

Tiu ekstravaganca fantazio komprenebligas pro la speciala laboro kiun mi ĵus estis plenuminta. Kiel profesoro pri Universala Historio, mi okupis min je la organizo de nova programo por la kurso. Mi sentis min eŭforia, pro la elfarita tasko, kaj sen ke mi perceptus, mia penso iradis trans la tiel longajn vojojn kiujn la popoloj travivis en la arbaro de la Tempo. Ĉar la vivo ŝajnis sufiĉe juna en la "carioca" (1) mateno, estis vera ĝuo rememorigi antikvajn gentojn kaj antikvajn farojn. La jarcentoj amasiĝis ĉe la malvastega apartementa teraso.

Kia multego da gloraj figuroj venis interparoladi kun mi! Kaj ĉiuj el ili, tiel diferencaj, unu de la aliaj! El la malproksima Hindujo alvenis princo, kiu pro amo al humileco prezentis sin vestita kiel mizerulo. Sed apud Budao aperis la fierega Kserkso, kiu per skurĝoj punbatis la maron, pro ties ŭdaco kunhelpi al la malvenko de lia skadro.

Proksime de la hela fizionomio de Jesuo mi renkontis la tertregan mienon de Judaso. Apud Sokrato mi distingis la moralan perfektecon de Platono kaj la malvirtojn de Alcibiado. La rido de Aristofano estis mallauĝita de la gemoj de Sofoklo. La braveco de Aleksandro kontrastis kun la timemeco de la persa reĝo. La ambicio de Cezaro, la abnegacio de Katono, la timigiga krueleco de Nerono la mildeco de Seneko, la frenezeco de Kalligulo, la mirinda mensa ekvilibro de Marko-Aŭrelio, trudis halucinaciajn komparojn ĉe la kadro de la romana mondo.

La civilizacio renovigita de la Kristanismo floradis, kun siaj unuaj sanktuloj, samtempe kiam barbaraj reĝoj ruinigadis Eŭropon...

Jen la Meza Epoko, kun siaj kruelaj baronoj kaj dolĉegaj bardoj, kun siaj krucmilitistoj kaj herozuloj; la Mezepoko, je kies sangakulita materruĝo subite aperas Atilo, kvazaŭ lupo malsatega, avida de buĉado, plezure amasmortigante tutajn loĝantarojn; kaj je kies kvieta vesperigo Sankta Francisko el Asizo nomas la lupojn mem fratojn.

Jen la Renesanco, kun siaj figuroj — grandanima kun Medicis; perfida, kun Borgia; rojalista, kun Makiaavelo; revema, kun Tasso; malbonmora, kun la Aretina verkajo; angela, kun la arto de Boticelli; fanatika, kun Savonarola; komprenpova kaj tolerema, kun Erasmo; — la Renesanco de Henriko VIII kaj Thomas Moore; de Lutero kaj Da Vinci, de senlima diverseco de tipoj, kiuj

kontraŭagas kaj kontraŭstaras, en sia antaŭgismaj grandeco.

Kaj ĉis la nuntempaj tagoj, kiom da strangaj figuroj, da originalaj personoj reaperis en mia kvazaŭ deliro! Goethe, kiu klinas sin por plaĉi la printon, kaj Beethoven, kiu rigidigas per sia aroganta memestimo; Bonaparte, konkerantu Eŭropon, kaj Washington, kreante la unuan liberan landon en Ameriko... La cinikeco de Tafflerand, la romantika idealeco de Camille Desmoulins; la espero, kiun priĉantis la poemoj de Viktor Hugo, la filozofia pesimismo kiu gemas en la verkoj de Schopenhauer...

La vidado de la plej halucinaciaj kontrastoj kaŭzis jam al mi kapturigon, kiam mi memoris pri Franklin Roosevelt kaj Adolf Hitler, la du ekstremaj limŝtonoj de la plej granda dramo de la homaro...

Por forliri el la kapo tiom da faktoj, mi proksimiĝis al la fenestro, por aŭskulti, el la strato, la bruado de la vivo. Ĉe la trotuaro, amanta paro diskutis, evidente pri ama malpaceto. La virino diris fine, kun profunda, definitiva konvinko: "Ĉiuj viroj estas egalvaloraj! Ĉiuj la samaj!"

Kaj ŝi foriris, aplombe certa ke ŝi eldiris veron — veron kiun miloj kaj miloj da ekzemploj, en la historio de la jarcentoj, ne sukcesus ŝanceli.

El la revuo "O Cruzeiro" esperantigis

Kotinja.

(1) Carioca (pr. karioka), kio apartenas al la brazila ĉefurbo Rio de Janeiro.

## PETIÇÃO AS NAÇÕES UNIDAS

Segundo o número de Julho-Agosto do corrente ano, do "Esperanto" da Universal Esperanto-Asocio, o total das declarações recebidas para serem encaminhadas às Nações Unidas, atingia 4.192.085, estando então o Brasil colocado em 4.º lugar, com 109.440 declarações.

Com as declarações de coletividades é certo que o total excederá 10.000.000 ao terminar o recebimento em 31 de Dezembro próximo futuro.

Do Brasil já encaminhamos as seguintes declarações coletivas: Federação Espirita Brasileira — 162.735; União dos Espiritistas do Brasil — 25.000; Liga Espirita do Brasil — 18.410; Sindicato dos Empregados em Estabelecimentos Bancários do Rio de Janeiro — 6.265.

Como dissemos em nosso último número, esperamos que os grupos e esperantistas isolados possam obter declarações de entidades que apoiem a nossa causa. Tais declarações, subscritas na fórmula usual pelo representante legal da instituição, devem conter, no verso, além de breve indicação da natureza da entidade, a menção do número de seus membros.

Será importante, também, obter-se a declaração de pessoas eminentes nos vários setores de atividade.

## CONCURSO ENTRE OS GRUPOS

A Liga Esperantista Brasileira promove, para 1949, um concurso entre os grupos filiados, com o fim de estimular ao mesmo tempo a ampliação dos quadros sociais e a formação e enriquecimento de bibliotecas esperantistas.

São estas as bases do concurso:

1.ª — Será vencedor em 1.º lugar o grupo que obtiver maior número de pontos, cabendo os segundos prêmios a todos os grupos que alcançarem mais de 50 pontos.

2.ª — Os pontos serão assim contados: cada Associa Membro (AM) — 1 ponto; cada Membro kün Järlibro (MJ) — 2 pontos; cada Membro Abonanto (MA) — 4 pontos; cada Membro Subtenanto (MS) — 10 pontos.

3.ª — Os prêmios consistirão em livros num valor proporcional às contribuições efetivamente pagas: o grupo colocado em 1.º lugar receberá 20% das suas contribuições; os outros grupos premiados, 10% das respectivas cotas.

4.ª — Os grupos terão a faculdade de escolher os livros, dentre os que se encontrarem à venda no país.

5.ª — O concurso será encerrado em 30 de Junho de 1949.

## Melhoramentos na séde

O desenvolvimento dos nossos trabalhos vai-nos levando a introduzir aperfeiçoamento neles, como a aquisição de arquivos, a organização de fichários, e agora a compra de um moderno mimeógrafo Style, que nos permitirá manter os mais fácil contato com os grupos, os associados, a imprensa.

De fato, comparando-se o nosso movimento em 1947 com o de 1937, veremos que nesse decênio o número de sócios e de grupos quadruplicou, e que o valor total das cotas é hoje oito vezes maior, havendo muitos membros passado a categoria superior.

Onde se notou maior aumento foi no movimento de livros, que se tornou cinquenta vezes mais considerável, circunstância que se explica não só porque nesse período se editaram mais livros que anteriormente como também porque a distribuição se fez mais eficaz, devendo-se mencionar também as nossas remessas para Portugal, Inglaterra, Estados Unidos, Bélgica.

Muito, porém, resta ainda por fazer, e para isso contamos com a cooperação generosa, tantas vezes demonstrada, dos nossos consócios. Eles sabem que para o nosso progresso não basta dizer "ONI faru"; cumpre que cada um, embora modestamente, sem vaidade, que seria imprópria de bons esperantistas, possa dizer de todos "Ni faru", ou melhor ainda "Ni faras".

# BRAZILA KRONIKO

**AMAZONAS** — “Amazonas Verda Stelo”, la bulteno kiun eldonas la Grupo Esperantista Verda Stelo, informas pri ĝia sidejo, dank'al komplezo de S-ro Desembargador André Araujo: Avenida Joaquin Nabuco n.º 1193, Manaus.

**BAHIA** — Nia samideano D-ro Jaddo Couto Maciel; radioamatoro PY8 AL), en la celo interkonatigi kun aliaj kolegoj kaj propagandi Esperanton, estas preta por komunikigi ĉiutage, je la 6a-7a matene.

**MARANHÃO** — “O Maranhão Esperantista”, oficiala organo de Santa Ludoviko Esperanta Klubo, en São Luiz, Ŝtata Ĉefurbo, komencis esti publikigata, la 14an de Julio. Direktoro, S-ro Oziel R. Carneiro; Sekretario, S-ro Paulo Amorim Cardoso kaj redaktoro, D-ro Olímpio R. Fialho. Nune funkcias tri kursoj por la instruado de Esperanto.

## MINAS GERAIS —

**Juiz de Fóra** — La gazeto “Gazeta Comercial” komencis publikigi portugalan tradukon de la libro “La Fino”, de Grafo Folke Bernadotte, el la esperanta eldono, faritan de prof. Jorge Sant'Anna. En la unua paĝo de ĝia numero de 2 Septembro oni legas detalan priskribon pri la livero de diplomoj al la lernintoj de la esperanta kurso de Associação Esperantista Granberriense, de la Instituto Granbery, kiuj sukcesis en la ekzameno, kiel ni jam informis en la lasta numero de O BRASIL ESPERANTISTA. Inter la diplomitoj estas la rektoro de la Instituto, la klera profesoro Vittorio Bergo.

**Belo Horizonte** — PRI 3, Radio Inconfidência, daŭrigas disradii nian esperantan programon por brazilaj aferoj, direktatan kaj parolatan de D-ro Wilson Veado, Delegito de UEA, Ĉiusabate, de 17a ĝis la 17-30 a (20a ĝis 20-30a laŭ Greenwich-horsistemo), per mallongaj ondoj je 49, 75m (6000 kilocicloj).

**PARAÍBA** — João Pessoa — Ekspozicio Esperanta —

Tabajara Esperanto-Klubo aranĝis la 2an Esperantistan Ekspozicion en la ĉefurbo de Ŝtato Paraíba. Ĝi estis malfermata al la publiko de 1 ĝis 8 Septembro, ĉe la sidejo de Associação Paraibana de Imprensa, kies prezidanto, S-ro José Leal bonvole kaj sindone helpis al la afero.

La ekspozicio konsistis el kelkaj standoj, kun lernolibroj, literaturaj verkoj, revuoj, gazetoj, poŝtmarkoj, afiŝoj, prospektoj.

La ekspozicio estis multe vizitata, kaj inter la vizitantoj kiuj skribis fervoran opinion pri ĝi, en la libro por la subskriboj, estas citindaj S-roj Luiz da Câmara Cascudo, konata verkisto, kaj José Leal. Ankaŭ vizitis la ekspozicion S-ro Apelles Lemos, prezidanto de Associação Potiguar de Esperanto, el Ŝtato Rio Grande do Norte.

“Diario de Pernambuco”, “Jornal do Comercio” (Recife), “A União”, “A Ordem” (Natal) kaj aliaj gazetoj donis sciigojn pri la Ekspozicio. Tabajara Esperanta Klubo — presigis kaj disdonis plurajn flugfoliojn kun informoj pri Esperanto, kaj invito por lerni la lingvon.

## RIO GRANDE DO NORTE —

**Natal** — La gazeto “A Republica” kiun eldonas la Ŝtata Departamento por Informado, inaŭguris gravan sekcion “Esperanto & Esperantismo”, publikigitan en ĉiu dimanĉa eldono de la gazeto. Redaktas ĝin nia samideano Arlindo Castor de Lima. Inter aliaj, ni jam legis liajn interesajn verkaĵojn pri “O Esperanto kaj la Religioj”, “Surprizo” (pri la vizito de S-ro Zuger), nederlandano; La poeto Ottoniel Menezes”; “Esperanto en Ŝtato Paraíba”; “Statistikistoj en Sankta Katerino”; “Mona Sistemo”; “Radioamatoroj”.

Ni gratulas S-roj Romildo Gurgel, direktoro de la gazeto, kaj A. Castor de Lima.

La katolika organo “A Ordem”, de Natal, sciigis pri la vizito farita al As-

sociação Potiguar de Esperanto, de S-ro Renato Lemos Diniz, sekretario de Tabajara Esperanto Klubo, kiu havis okazon paroli pri la progreso de la esperanta idealo en la Ŝtato Paraíba.

Associação Potiguar de Esperanto, Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte, klopodas por organizi esperantistan semajnon, de 8 ĝis 15 decembro. Estos ekspozicio de esperantaĵoj, ĉe centra ejo, en la ĉefurbo. La Asocio akceptos kore ĉion kion niaj samideanoj povos sendi, por la brilo de la ekspozicio.

**RIO GRANDE DO SUL** — La konata ĉiudusemajna revuo el Porto Alegre — “Revista do Globo”, en sia numero de 10 Julio enhavas bonegan ilustritan raporton pri Esperanto, verkitan de S-ro Rubens Vidal, kun fotografiaĵoj de Ed Keffel. Ĝia titolo estas — “Antes, durante e depois de Zamenhof” (Antaŭ, dum kaj post Zamenhof).

La raportisto priskribis interese viziton faritan al esperanta kurso direktata de Kolonelo Wanderley, kaj al la sidejo de Clube Esperantista de Porto Alegre, kie okazis festeto.

Li rakontis pri la esperantaĵoj kiujn li vidis, kaj la konversacioj kun la kleraj samideanoj en la Suda Brazila Ŝtato A. Flores, Kol. Wanderley, A. Zamora, delegito de UEA, Torelli kaj Benjamim Camozato, pioniro de Esperanto en la Ŝtato, kiu ĉeestis la 4an Universalan Kongreson en Dresden, Germanujo, kiam li konis D-ro Zamenhof kaj eĉ faris kun li postkongresan ekskurson



Um dos "stands" da Exposição

al Finnlando kaj aliaj nordaj landoj de Eŭropo.

Meritas koran gratulon la aŭtoroj de la raporto kaj la direktoroj de "Revista do Globo".

— **Dom Pedrito** — Centro Espirita João Batista, dum la semajno kunfratiga (junio) distribuis propagande flugfoliojn kun informoj pri nia lingvo.

"Suda Stelo", la oficiala organo de Esperantista Societo de Porto Alegre, en sia n.º de Majo-Junio enpresis bonegan verkon titolitan "Esperanto"; originalaj versoj de Pastro J. N. Machado, S. J., kaj muziko de Pastro F. B. Leal, S. J.

La monata revuo "Idade Nova" (Nova Aĝo), de Porto Alegre, enhavas sekcion "Esperanto", redaktatan de nia samideano Ivo Sanguinetti. Ni gratulas, kaj dankas pro la sendo de la Septembro numero.

Rev. Sirio Joel de Moraes daŭrigis la propagandon de Esperanto, per radiaj paroladetoj en la stacio Z Y G 4 (Rádio-Cultura de Bagé).

RIO DE JANEIRO — "Esperanto Klubo", ĉe Associação Cristã de Moços (Kristana Asocio de Junuloj) daŭrigas la funkciadon de siaj kursoj kaj kunvenoj.

Ĉe Federação Espirita Brasileira oni faras superan kurson, kies direktanto estas profesoro Porto Carreiro Neto, de la Escola Nacional de Química, kaj elementan kurson, kiun direktas profesoro Paulo de Oliveira Ludka, anstataŭnato de prof. Aldino de Freitas, kiu estas nun en Belo Horizonte.

La organo de F.E.B. "O Reformador" enhavas ĉiam artikolojn kaj poemojn esperantistajn tre ŝatatajn.

Asocio Esperantista do Rio de Janeiro okazigas siajn kutimajn kulturkunvenojn, laŭ ni legas en ĝia monata organo "Rio Esperantista".

Ĉe sia sidejo (Praça da República n.º 54, 1.º andar), Brazila Klubo Esperanto okazigis kunvenon, por la livero de atestoj pri lernado al la lernintoj de la kurso farita antaŭ nelonge de profesoro Octavio Vianna Peixoto, kaj ankaŭ por la akceptado de la diplomitoj de la esperanta kurso direktita de prof. Paulo O. Ludka ĉe F.E.B.

Post kiam prof. Vianna Peixoto faris la oficialan paroladon, kaj je la nomo de ĉiuj lernintoj parolis la plej juna el ili, la 12-jara knabo Ivo Candeias, ĉiu ricevis la ateston, kaj ekzempleron de la libro "Esperanto-Modelo".

Poste, sekvis alia parto de la kunveno. La juna studento Henrik Kocher disertis pri la vivo kaj verkoj de René de Chateaubriand, kaj legis la finan parton de Aventuro de la lasta Abencerageo, esperanta traduko de R. Deshays.

S-ro M. Aveleza de Souza legis interesan paroladon pri turisma vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, realigita de la esperantisto S-ro Walter D. Gilker, kuracisto nordamerika, kiu ne povis ĝin diri persone pro neatendita reveno al lia lando.

SÃO PAULO — S-ro Adolpho Carvalho Sobrinho, de Campinas, filiita al la "Círculo dos Radioamadores esperantistas", aperigis interesan karton, dediĉitan al disdonado inter la radioamatoroj, sur kiu li liveras informojn pri Esperanto, kaj montras la neceson ĝin lerni.

La grava ĉiutaga ĵurnalo "A Gazeta", de São Paulo, presigis en sia n.º de 21 Septembro bonegan intervuon kun nia samideano Francisco S. Almada, el Santos. La raporto estas vere interesa, kaj certe multe helpos la propagandon de Esperanto.

SANTA CATARINA — **São Francisco do Sul** —

Ni ricevis la statistikan resumon de la lecionoj faritaj en la kursoj kiujn subtenas Esperanta Klubo Everardo Backheuser, de februaro ĝis junio.

**Esperantista Klubo de Florianópolis** — Pro translokiĝo al Porto Alegre, S-ro Mario J. Mattos forlasis la prezidantecon de E.K.F. Jen la nuna estraro: F-ino Aurea E. Bauer, prezidantino; S-ino Olga de Oliveira Schmidt, sekretariino; S-ro Washington Luiz do Valle Pereira, kasisto; S-ro Ari Kardec de Mello, kultura departamentestro.

Z. Y. J. 7. — **Radisocieto Guarujá** — (Florianópolis).

Dank'al klopodoj de F-ino Aurea E. Bauer kaj Helena N. Spyrides, tiu radistacio disradias esperantan programon ĉiusabate, dum 15 minutoj, je la 19a.

Brazila Ligo Esperantista ricevis serion da fotografiaĵoj pri la kurso de Esperanto ĉe la Statistika Departamento de Ŝtato Santa Catarina; kies instruanto estas S-ro G. P. Faraco, estro de la

## OFICIALAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN ŜTATO SANTA CATARINA

"Antaŭen", organo de Clube Esperantista de Florianópolis, aldonis al sia numero Julia du gravajn ordonojn eliritajn el "Diário Oficial do Estado de Santa Catarina" (2-7-1948).

Tiuj oficialaj ordonoj (portarias n.º 44 e n.º 45) de la Ŝtata Departamento pri Statistiko temas pri kurso de Esperanto, starigita en la Departamento, por ties oficistoj.

La ordonoj enhavas regularon pri la programo de la Kurso, horaro de la lecionoj kaj pago al la profesoroj (po 40 kruzejoj aŭ 2 dolaroj por leciono).

La instruisto de la unua kurso, en kiu enskribiĝis 21 gelernantoj, estas profesoro Giovanni Faraco.

## KONKURSO

En nia proksima numero ni donos la rezultaton de la konkurso malfermita en "O Brazila Esperantista", Sept.-Dec. 1947.

## NASKIĜO

"Mi nomiĝas Márcia, kaj sciigas ke mi venis en la mondon la 8an de Julio. Malgraŭ la nebulo kiu vualis la urbon Sankta Paŭlo, mi alteriĝis feliĉe, kaj surprizis miajn gepatrojn."

Dankante ŝian komunikaĵon, ni sendas korajn bondezirojn al Márcia, kaj gratulojn al ŝiaj gepatroj, niaj karaj samideanoj Victor kaj Artemisa Míniro.

to estas S-ro G. P. Faraco, estro de la Divizio Teknika, kaj lia Kajereto "Kion ni faras, kio ni estas...", sciigoj pri la Departamento, por esti uzataj de la gelernantoj de la Kurso.



S-ro Giovanni P. Faraco instruas Esperanton en kurso ĉe la Statistika Departamento de Santa Catarina

## NEKROLOGO

## Pastro Leonel Franca

En tiu ĉi urbo mortis la 3-an de Septembro la eminenta pastro Leonel Franca, jezuito, rektoro de la Katolika Universitato de Rio de Janeiro.

Kiel reprezentanto de la Edukaj Asocioj, li estis unu el la subskribintoj, en 1938, de la raporto n.º 299, kiu pri la temo — Enkonduko de Esperanto en la lernejoj, opiniis ke oni devas akcepti la alvokon de Brazila Ligo Esperantista, por ke Brazilo donu sian oficialan aliĝon al la Lerneja Interŝtata Esperanto-Akordo, kies teksto estis en la manoj de la ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, en Ĝenevo.

## ESPERANTO KAJ RADIOFONIO

La disko-kolekto, organizata de Brazila Ligo Esperantista por disradiado per Rádio Ministério da Educação e Saúde, jam havas la jenajn muzikaĵojn: Querino de Oliveira, "Kanto de l' Ekzilo", kaj N.N., "Sankta Luĉio", kantitaj de Iná Verney Lindenberg; Schubert, "Serenado" kaj "Ave Maria", kantitaj de Iara Coelho; Schumann, "Koleron for!" kaj "La du grenadistoj", Giordano, "Ho kara vi", Carl Loewe, "La Horloĝo" kaj Bizet, "Ario de l' Toreadoro, kantitaj de Asdrúbal Lima; F. du Ménil, "La Espero", ludita de Edith Bulhões Marcial.

La programo "Esperanto — Língua Internacional" estas dissendata ĉiulunde, je la 13,30 ĝis la 13,40 horoj, per mezaj kaj mallongaj ondoj (375 m kaj 30,71 m).

La parolata parto (kroniko kaj informoj) estas farata de D-rino Ilka Duque Estrada, membro de B.L.E.

## ESPERANTAJ RESUMOJ EN REVUOJ GEOGRAFIJAJ

Jus aperis la volumo LII de la "Revista da Sociedade de Geografia do Rio de Janeiro" (adr.: Praça da República, n.º 54), dediĉita al la fama brazila ŝtatestisto Barão do Rio Branco pro lia unua centjarfesto. Tiu numero, presita de la Nacia Presejo, enhavas resumon en Esperanto de ĉiuj artikoloj. De preskaŭ 20 jaroj tiu grava revuo publikigas tiajn resumojn.

Ankaŭ la oficiala "Revista Brasileira de Geografia", organo de Nacia Konsilantaro de Geografio (adr. Praça Mahatma Gandhi 14, S.) publikigas, de sia apero en 1939, resumojn de la ĉefaj artikoloj.

## FRAMASONAJ PASPORTOJ EN ESPERANTO

La Grandoriento de Brazilo, per sia Superulo, D-ro Joaquim Rodrigues Neves, komunikis al Brazila Ligo Esperantista ke ĝia Konsilantaro decidis ke la framasonaj pasportoj, donitaj de tiu Grandoriento, estu ankaŭ skribitaj en Esperanto; kaj la Superulo petis al B.L.E. ke ĝi traduku la tekston de la pasporto.

La letero de la eminenta advokato D-ro Rodrigues Neves enhavas vortojn tre favorajn por nia lingvo, "kiu efikas por la unuigo de la homoj de ĉiuj landoj per pli solida frateca ĉeno".

Plenuminte la honoran taskon, B.L.E. donas al la legantoj de nia gazeto tiun gravan ĝojigan sciigon.

## NIETZSCHE SOBRE A LINGUA INTERNACIONAL

Aprender várias línguas enche a memória de palavras, em vez de fatos e de idéias, quando essa faculdade não pode em todo homem receber senão certa quantidade determinada de conteúdo. Depois, o fato de aprender várias línguas é nocivo, naquilo que produz a ilusão de ter capacidades, e efetivamente dá também nas relações certa aparência falaz; depois é nocivo ainda indiretamente, naquilo que se opõe à aquisição de conhecimentos de fundo e à intenção de merecer a estima dos homens por meios leais. Enfim, é o machado posto na raiz do sentimento um pouco delicado da língua materna: este é com isso incuravelmente ferido e levado à ruína. Os dois povos que produziram maiores artistas de estilo, os Gregos e os Franceses, não aprendiam as línguas estrangeiras. Mas como o comércio dos homens se torna cada dia mais cosmopolita e como, por exemplo, um bom negociante de Londres deve desde agora fazer-se compreender oralmente e por escrito em oito línguas, cumpre reconhecer que o estudo de várias línguas é um mal necessário; mas também acabará, chegando ao extremo, por forçar a humanidade a achar um remédio; e, em futuro tão remoto quanto se quizer, haverá para todo o mundo uma língua nova, que servirá primeiro de meio de comunicação ao tráfico, em seguida às relações intelectuais, com tanta certeza como haverá um dia uma navegação aérea. De outra forma, de que serviria que a linguística tenha estudado durante um século as leis da linguagem e apreendido em cada uma das línguas o que há de necessário, de útil e de acertado? (*Frederico Nietzsche — HUMANO, DEMASIADO HUMANO*, I vol., § 267, 1876)

## Fratario Rozo-Kruco

La grava societo "Fraternidade Rosa Cruz" (Fratario Rozo-Kruco) de Rio de Janeiro, kiu sur spiritualisma bazo celas la plibonigon de la individua memo, kiel ankaŭ la kunfratigon de la homoj, kaj kiu reprezentas la samboman societon "Antiqua", el Germanujo, kaj ties amerikana branĉon, interesiĝis pri la afero Esperanto, kiel rimedo por la homa interkomprenigo, kaj tial petis de Brazila Ligo Esperantista ian klarigon pri la lingvo internacia. Nia Ligo komisiis por tio sian Ĝeneralan Sekretarion, Prof-on Porto Carreiro Neto, kiu je la 2-a de aprilo ĉijara faris paroladon en la sidejo de tiu "Fratario", ĉe strato SaBoia Lima 77. Antaŭ ĉirkaŭ kvindek aĵoj de tiu societo, kiuj montris vivan intereson pri la temo, Prof-ro Porto Carreiro klarigis, kio ĝustedire estas Esperanto kaj kiu ĝia motivo; li atentigis al la profito, kiun al ĉiu havigas ia helpa lingvo, kaj al la utiloj de vera amikeco, kiujn ĝi naskas inter la homoj; li diris, kiu estas, unuvorte, la celo de Esperanto: amo per interkomprenigo. Li redefigis la mirindan figuron de Zamenhof, kiu post pluraj talentaj homoj, fine solvis la problemon de lingvo internacia: ĝuste tial, ke lia koro estis pli granda ol lia cerbo; el tio la membroj de tiu societo, kiu batalas por frateco, facile komprenis, ke tia rimedo, kreita per la koro, plej taŭgas por ĝia celo mem kaj respondas al ĝiaj bezonoj kaj altaj sentoj. Prof-ro Porto Carreiro ne forgesis menciigi kelkajn punktojn de la movado de Esperanto en Brazilo: precipe la venkojn de nia Ligo ĉe la Federacia Registaro, kiu ne nur rekonis ĝin kiel societon de publika utileco, kiel ankaŭ helpas ĝin per ĉiaj rimedoj, ĉe la poŝto, la telegrafo, la foiroj, la kongresoj, la lernejoj, la radiofonio k.a.; ĉiujn tiujn brilajn venkojn en nia lando, oni povus diri Esperanto ŝuldas al la neforgesebla eksprezidanto de B.L.E., D-ro Alberto Couto Fernandes, jam ne vivanta en nia materia medio. Li ankaŭ menciis la firman apogon de la Brazila Spiritisma Federacio, kiu, jam de pli ol dek jaroj enmetis Esperanton en sian programon de propagando de la doktrino, eldonante verkojn en nia helpa idioma, publikigante artikolojn kaj Esperanto-redaktaĵojn en sia oficiala organo, ĉiujare farante en sia sidejo kursojn de Esperanto, aliĝante al niaj kongresoj k.t.p. Nia samideano instigis siajn aŭdantojn kaj ĉiujn membrojn de iaj ajn religioj, doktrinoj kaj sektoj sekvi tiun bone inspiritan iniciaton, por ke ĉiuj homoj, serĉantaj la Veron, estu kune sur neŭtrala kampo.

Post tiu parolado, la prezidanto de la societo, S-ro Moacyr do Espírito Santo, dankis sian Ligon pro la kontentigo de lia peto kaj deklaris, ke estas malfermita, de tiam, la enskribo en balduna kurso de Esperanto, en la sidejo de la "Fratario".

## ESPERANTAJ POŝTKARTOJ

Pere de S-ro Roberto das Neves, Caixa Postal 142, Lapa, Rio de Janeiro, ni ricevis kolekton de 12 malsambildaj poŝtkartoj. La bildoj konsistas el alegorioj pri la Esperanta movado, arte desegnitaj de la konata artisto Arcindo Madeira.

## BIBLIOGRAFIO

LA VANA KANTO — Lucien Thévenin. Eldono de "Kompreni", 32, Cow's Gambetta, Lyon (VIIe) Francujo. Versoj dediĉitaj al la internacia amikeco, de nia samideano Thévenin, jam konata kaj satata poeto. En tiu ĉin nova verko li kolektis 67 ĉamajn poeziojn. Kiujn oni legas facile kaj kun vera plezuro. Lingvo klara, simpla, sen tordiĝoj. Jen unu el ili:

## EN GARDENO

En ĝardeno apud maro,  
Sur la rando de l'pinaro,  
Sole, staras la dometo  
Kie loĝas la poeto.

El la kamentubo, fumo  
Supreniras en la lumo  
Dum en la ĝarden' trankvila  
Kreskas la floraro briĉa.

Tie gladioj floras  
Kaj siringoj bonodoras.  
El koroloj, la abelo  
Sukas sukon por mielo.

Tie el la propra koro  
Kiel la insekt' en floro,  
La poeto sukon tiras  
Kiu homajn vundojn ŝmiras.

Jarlibro 1947. IEL — UEA — Nia poruzo de membroj. 250+64 paĝoj. Launua parto enhavo entaŭparolon de S-ro L. Bastien, prezidanto de IEL; enkondukon de S-ro C. C. Goldsmith, ĝenerala sekretario, kaj la akordon de Berno 1946, pri la funkciado de UEA (IEL kaj UEA kunigitaj). Venas poste la kutimaj nomaroj-estaro, komitato, membraro, statistikoj, organizaĵoj, gazetaro, laŭlanda delegitaro.

La dua parto enhavas interesan terminaron pri kudra kaj trika laboroj. *Vivo kaj arto de Goya* — Agostinho da Silva — El la portugala tradukis Vergilio Mendes. (Portugala Eldona Rondo). Monte da Lapa, 41-9, Porto, Portugalujo. Ĉi tiu verko estas la dua kajero de la serio "Enkonduko en la Kulturon". Per simpla korekta lingvo la aŭtoro priskribas la vivon de Francisko de Goya, ekde lia naskiĝo, en 1746a jaro, ĝis lia morto, en 1828.

"Versaĵoj de Joe". Verketo kun versaĵoj elektitaj el la Sukro-Eldonaĵoj 1935-1946 (2 Cambridge St., Willoughby, N. S. W. Australio). La enhavo konsistas el versaĵoj — pri la Esperanta celo; esperantistoj (el angla, permana, ĉina, japana); amuzaj, pesimismaj, religiaj, ĝeneralaj, amo, al Narcisa.

6 diversaj kantoj — La revuo "Kompreni" eldonis, kun muziko sur kartono, ses kantojn: Kanto de l'migruloj; Tra la montoj; La Bohemo; Antaŭen; La Kaprino; La Ĝeranoj. Mendoj al C. Chalas 41, rue des Tables Claudiennes-Lyon, France. Prezo de la 6 kantoj: 30 fr. fr. aŭ 3 internaciaj respondkuponoj.

XIIa Kongreso de Flandra Ligo Esperantista — La Organiza Komitato de la XIIa Kongreso de Flandra Ligo Esperantista eldonis interesan kongreslibron, okaze de la Kongreso, en Mechelen, Belĝujo. Krom la parto pri Kongresaranĝoj la libreto enhavas artikolon de ĝenerala intereso: la historio de Mechelen, kun 2 tekstoj "novelaj", en konduko pri la sesdejarveco de Esperanto kaj homaraĵo pri la grava malsano "esperantisto".

Panorami Fleristicii Vicentini — El la fitmo Index (Capella Postale 145 — Vocenza, Italujo) ni ricevis ekzempleron de "Panorami Fleristicii Vicentini", en itala lingvo. En tiu eldonaĵo, destinita al la italoj, oni parolas pri a itaa kaj eksteranda esperanta movado. Inde intencas eldoni lingvan, filatelan kaj esperanto-propagandan materialon.

NOVAJ ESPERANTO HISTORIE TOJ — Diversaj aŭtoroj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando, 1947. Tiu verko konsistas el 70 historietoj, kelkaj spritaj, kelkaj naivaj, kies celo estas doni al Klubo Kursoj kaj Studironaj materialon por facila legado kaj parola eksercado. Ĝi servas ankoraŭ por legado al novaj esperantistoj, kiuj timas ankoraŭ longajn verkaĵojn.

ARBOJ DE LA ARBARO KAJ KAMPO — De Frank Booth. Kun ilustraĵoj de Edith R. Turlington. Eld. de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. La aŭtoro de tiu bela broŝureto post unue pritrakti la arbojn, ĝenerale, donante sciigojn botanikajn pri ĝiaj partoj, priskribas diversajn arbojn — frakseno, platano, acero, fago, karpino, ulmoj kaj kverko. Estas tre interesaj la ilustraĵoj, precipe tiuj kiuj montras la aspekton de la arboj vintre.

CU ATOMBOMBO MINACAS. — Norbert Barvoschek. Graz — Aŭstrujo (Bergmannngasse 5-11, poŝtflako 50). Tiu broŝuro ŝatas la intercesojn pri la astrologa scienco kaj la profetaĵoj de Nostradamo. Pri la atombombo aŭtoro, "konsiderante la ĝisnunan surteran evoluigon de la aferoj bone harmoniantan kun la surĉielaj planedo-moviĝoj, la datoj de li eltrovitaj per kalkulado estas signalantaj kiel tempoj plenaj je danĝero".

HISTORIO DE USONO — Agostinho da Silva. El la portugala trad. Manuel de Freitas. Portugala Eldona Rondo, 1947. En tiu broŝureto, el la trio "Enkonduko en la Kulturon", la aŭtoro priskribas la interesan historion de Usono, ekde la tempo kiam alvenis al Norda Ameriko la unuaj eŭropanoj, ĝis la nuna tempo.

LERNU ESPERANTON — Daniel Quarello. Eld. Quarello & Cia., Buenos-Aires. Ĉi tiu broŝuro estas la unua ekstrakto el la verko *Lernu Esperanton*. Ĝi pritraktas precipe la gramatikan parton de la verko en Esperanto.

## BRAZILIO EN LA XXXIII UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Brazila Ligo Esperantista, ne povante sendi specialan delegiton al la XXXIII Universala Kongreso de Esperanto, en Malmö, sin turnis al S-ro D-ro Manuel César de Góis Monteiro, Brazila Ministro en Svedujo, kun la peto ke li bonvole nomu membron de la Legacio en Stokholmo por reprezenti la brazilan esperantistaron.

D-ro M. C. de Góis Monteiro afable respondis komunikante al B.L.E. ke li nomis por tiu tasko la legacian sekretariojn S-ro Carlos Buarque de Macedo.

Ni dankas S-ron Ministron pro lia komplezo, kiu ebligis al Brazilo esti ankaŭ en tiu kongreso, pri kiu ni raportos en nia venonta numero.

## BRAZILA KLUBO ESPERANTO

La 27an de Junio, ĉe Brazila Klubo Esperanto okazis ĝenerala kunveno por efektiviĝi la balotado de ĝia nova estraro. Estas aprobitaj la protokolo de la antaŭa kunveno, la raporto de la prezidanto, kaj la bilanco de la kasisto, rilata al jaroj 1946-48.

F-ino Irani Baggi de Araujo proponis ke oni metu en la protokolon kondolencan voĉdonon pro la morto de la esperantistaj Ĝeneralo J. Silveira Sobrinho, Komandanto P. Manot Sarrat kaj João Duarte da Silveira. La propono estas unuanime aprobita.

Laŭ propono de D-ro Carlos Domingues, oni reelektis per akklamado la Estraron kaj ankaŭ Konsilantaron, kun anstataŭo de tri membroj, pro morto kaj eksigo.

Jen estas la estraro: Prezidanto, S-ro A. Caetano Coutinho; Viceprezidanto, S-ro Antonio José Vaz; Ĝenerala Sekretariino, F-ino Maria do Amaral Malheiro; 1a. Sekretario, D-ro J. A. Pinto do Carmo; 2a. Sekretariino, F-ino Maria da Luz Costa; Kasisto, S-ro Getúlio Soares de Araujo; Bibliotekistino, F-ino Débora do Amaral Malheiro.

Konsilantaro: S-ro Arminio de Moraes, S-ino Balbina de Moraes, D-ro Carlos Domingues, D-ro Fernando Augusto Almeida Brandão, F-ino Irani Baggi de Araujo, S-ro Ismael Gomes Braga, D-ro Leonel Gonzaga da Fonseca. Pastro Mariano Plana, D-ro Mario Ritter Nunes, D-ro Miguel Timponi, D-ro Teobaldo Recife kaj D-ro Theophilo de Almeida.

## NENIO NOVA SUB LA SUNO

Post la fino de la lasta kurso brile gvidita de Prof. Aldino de Freitas ĉe Brazila Spiritisma Federacio, fervonaj junaj esperantistoj proponis al tiu Federacio la aranĝon de ekspozicio de Esperantaĵoj en ties sidejo. La Estraro afable akceptis la ideon kaj aldiris, ke la fakto ne estos unua, ĉar antaŭ 34 jaroj ĉi tie efektiviĝis belan ekspozicion de Esperantaĵoj de tiu tempo. Ni ja trovis en "Brazila Esperantisto" de Majo 1913 la jenan noton:

"La 2 an de la sama monato (aprilo) en la ĉefa salono de "Federação Espírita Brasileira", S-ro Giovanni Leoni faris belan paroladon pri "Esperanto kaj Spiritismo". Li estis prezentita al la aŭdantaro de S-ro Leopoldo Cirne, ĝenerala prezidanto de la Federacio. Post la parolado oni vizitis la ekspozicion tie aranĝitan de S-ro José Macrudo Tosta, kiu post du tagoj malfermis ĉe la Federacio kurson, en kiu jam enspribiĝis 23 ĝelernantoj".

Leoni, Tosta, Cirne jam de longe mortis. La tuta Estraro de tiu Federacio jam estas nova, sed la tiega laboro por Esperanto firme daŭris kaj konstante krekis. Nenio nova sub la suno, sed la persistemo de asocioj, en kiuj la laborado por Esperanto daŭras tra jardekoj malgraŭ anstataŭado de la Estraroj kaj de la membraro, tia persistemo estas io nova sur la Tero kaj garantias la verkon de nia movado!

# O Esperanto no estrangeiro

**ALEMANHA** — Existem atualmente na Alemanha 118 grupos esperantistas. Germana Esperanta Asocio conta mais de 6.000 associados, dos quais cerca de 1.000 em Munique, e cerca de 500 em Hannover.

O Esperanta Instituto de Germanujo fará parte da Universidade de Munique, e terá a seu cargo os exames de Esperanto.

O Congresso Esperantista realizado em Munique foi verdadeiramente imponente. Nele tomaram parte cerca de 2.100 pessoas. O prefeito de Munique, Dr. Scharnagl, foi o presidente de honra. A sessão solene foi aberta pelo Dr. Ziegler, presidente de Germana Esperanta Asocio. Falaram: o Ministro da Cultura, Dr. Hundhammer, em nome do parlamento bávaro, em esperanto, e um de seus membros, Lorentz, e em nome da Universidade de Giessen o professor Strecker.

**AUSTRIA** — O arcebispo de Salzburg, Dr. Andreo Rohrachar, aceitou ter sob sua proteção a liga dos esperantistas católicos, em sua diocese Salzburg e partes do Tirol. Destarte juntou-se a outros altos membros da Igreja, como o cardinal Th. Zumitzer e seu predecessor, Cardinal Piffli.

A Liga Esperantista Católica Austríaca tem por escopo propagar e aplicar o Esperanto, em bases plenamente religiosas.

— Contando 81 anos, faleceu o padre F. Wolfgang Nedwid, O.B.S. decano de Schottenstift, em Viena. O morto foi durante 10 anos presidente da União Católica Esperantista de Viena. Sexagenário, fez exame para obter o diploma de professor de Esperanto, para cuja propagação muito concorreu nos meios católicos.

**BOLÍVIA** — A Associação Boliviana de Esperanto prepara sua 1.ª Convenção Nacional de Delegados, para Outubro, em La Paz.

Fazem parte da Comissão Organizadora o Sr. Tibor Sekelj, que esteve há pouco tempo entre nós, e o Sr. Roberto O. Lucia.

**CHECOSLOVAQUIA** — O Esperanto está sendo ensinado, em cursos facultativos, aos alunos de diversos estabelecimentos de ensino: Ginásio Blahoslav de Ivančice, IVª Escola de Liberec, etc.

— Em Košice realizou-se o 2.º Congresso Esperantista eslovaco, em Agosto, ao mesmo tempo que a exposição industrial eslovaca.

— A Câmara de Comércio em Olomouc, em três livros da coleção que está editando, inseriu resumos em russo, francês, inglês e Esperanto.

— A Administração da Checoslovaquia tem publicado, em Esperanto, para distribuição, diversos folhetos, bem compactos e belamente ilustrados, para propaganda turística do país. Entre eles citamos: "Vizitu Ĉeĥoslovakion! Ĉeĥoslovaka esperantistaro vin atendas — Altaj Tatroj — Ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervotoj — Saluton — Vizitu Ĉeĥoslovakian Respublikon".

**CHILE** — O jornal "El Diario Ilustrado", de Santiago de Chile, publica interessante seção "El Esperanto através del mundo", resumo de notícias sobre o Esperanto, compiladas pela Liga Esperantista de Chile.

**CHINA** — O eminente esperantista padre J. Baptista Kao fixou residência em Nankim, chamado pelo Internúncio Apostólico para o cargo de diretor da Seção Escolar da Repartição Central Católica.

**HUNGRIA** — A cidade de Ujpest deu a uma de suas ruas o nome de Waldemar Langlet, pioneiro do movimento esperantista na Suécia, e que em 1944 permaneceu em Budapeste, como representante da Cruz Vermelha Sueca.

**INGLATERRA** — De 14 a 17 de Maio realizou-se o 33.º Congresso Britânico de Esperanto, na bela cidade de Southport. Ao Congresso compareceram cerca de 300 esperantistas. Houve reuniões de diversas associações, entre elas — Esperanta Spiritista Societo, Brita Esperanta Scienca Asocio, Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj, Brita Ligo de Katolikaj Esperantistoj, Tutmonda Junular-Organizo, Kvakera Esperantista Societo, Universala Ligo.

**ITALIA** — O Dr. Corrado Cerri (Casella postale n.º 69, Varese) pretende editar o "Libro por Korespondemuloj", que aparecerá periodicamente, com anúncios de esperantistas que desejam corresponder.

Itala Esperanta Federacio está organizando o Congresso Nacional de Esperanto, em Turim, a realizar-se em Setembro. Endereço do Kongresa Komitato: Ing. E. Aprozio, via Morgheu 34, Torino.

A revista de medicina "Giornale di Clinica Medica" publica todos os seus importantes artigos em língua italiana e também em Esperanto.

— Por iniciativa da Itala Esperanto Federacio, o Touring Clube Italiano ateitou a proposta de incluir, entre os assuntos a serem tratados na reunião de 1949, da Alliance Internationale de Tourisme, o do uso prático do Esperanto para todos os associados. Para bom resultado da iniciativa, as associações congêneres em diversos países deveriam fazer o mesmo.

**ROMA** — Celebrou-se a 9-XI-1947, na Catedral Franciscana, o dia dos esperantistas católicos. Tomaram parte mais de 500 pessoas. Na basílica Santo Antonio, durante a missa realizada, o padre P. Carolli pregou em Esperanto.

O Cardinal príncipe Sapieha, em audiência concedida ao professor M. Szymarski, de Cracovia, depois de ter sido informado do movimento católico esperantista, interessou-se pelo Esperanto, prometendo favorecê-lo.

**JAPÃO** — Osaka — O grupo esperantista desta cidade tem atualmente 2.000 membros.

O Esperanto está sendo ensinado em dois importantes colégios da cidade.

**O. Deguci** — Contando 78 anos, faleceu em Janeiro, Onizabro Deguci, o fundador de OOMOTO, eminente esperantista, delegado de UEA em Kameoka, autor de vários compendios de Esperanto para os japoneses. Encarcerado durante 6 anos, foi libertado logo após a derrota do Japão, tendo restabelecido o movimento anterior, sob o nome de Aizen-en.

A Sociedade Japonesa de Matemática editou interessante trabalho — *La Funkciaj Ekvacioj*.

**RÚSSIA** — Do relatório do "plenum-Komitato" de S A T, para o período de Junho 1947 a Maio 1948:

Nosso "Sennaciulo" continua a penetrar na Hungria, Checoslovaquia, Bulgária (nem sempre desembaraçadamente), Iugoslávia, Polónia, Finlândia e na zona soviética germânica. Em alguns destes países mesmo nosso movimento é bastante próspero. Mas as fronteiras russas ainda estão fechadas ao nosso órgão mundial. Aliás, a correspondência esperantista com esse país não é senão embrionária, é quase inexistente. Nossos esforços junto ao embaixador da Rússia, em Paris, foram vão — nem ao menos ele respondeu à nossa carta!

**SUECIA** — O parlamento sueco aprovou, unanimemente, a proposta governamental de consignar 12.000 coroas ao LKK do Universala Kongreso em Malmö. Esta decisão mostra a compreensão geral das instâncias oficiais da Suécia em favor do Esperanto.

Al niĝ kara FRANCISCO V. LORENZ

(okaze de l' 75a naskiĝtaga datreveno.)

- 1.) *Jaro venis, jaroj pasis.  
Ili faris nin maljunaj.  
Ofte ili estis tedaj.  
Parte tamen ankaŭ sunaj.*
- 2.) *Vi travivis longan vivon.  
Ŝepdek kvin da jaroj estas.  
Grava sumo, sed kolome  
Tiom ree ni kunfestas.*
- 3.) *"Mia laŭdo huras palmojn"  
De vi majstre tradukita  
Oni povis nur esperi  
De poeto inspirita.*
- 4.) *Ho! kiom da foje oni  
Jam ĝin kantis, eĉ kongrese  
Kaj pro tio granda aro  
Poste sekvis interese.*
- 5.) *Ni vin forte tial laŭdas  
Kaj aŭdigas laŭtajn palmojn.  
Vi ja laŭdis nin landon,  
Niajn birdojn, niajn palmojn.*

Francisco S. C. Schaden. 1947.